De la Federación Española de Esperanto



AÑO 41 Nº 289 ENERO—FEBRERO 1989

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

Dirección y administración
Carreras Candi, 34 – 36
08028 BARCELONA

REDACTOR JEFE
Giordano Moya Escayola
Balmes, 38. Tel. (93) 7881839
08225 TERRASSA (BARCELONA)

COMITE DE REDACCION
Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Marco Botella

Jarabono . . . . . . . . . . . 1500 p-toj

**ENHAVO**

La kovrilo: Miguel Sancho Izquierdo, honora Prezidanto de HEF

| | Paĝo |
|---|---|
| 49a Hispana de Esperanto | 6 |
| Piloloj (2) | 5 |
| Paĝoj el la Hispana Beletro | 6 |
| 44a I.J.K. de TEJO | 9 |
| Nekrologo | 12 |
| Universala Kongreso de Valencio | 13 |
| Tre Grava enketo | 15 |
| HEF sidejo en Barcelono | 17 |
| La familioj Valoroj | 18 |
| Turisma Esperanto - Kongreso | 20 |

Depósito Legal: VA. 616 – 1978
G.E.T.

UTILAJ ADRESOJ

Hispana Esperanto-Federacio
Carreras Candi, 34-36
Tel. (93) 240 26 62
08028 BARCELONA

PREZIDANTO. Salvador Aragay

VICPREZIDANTO. Luis María Hernández

SEKRETARIO. Víctor Ruiz

VICSEKRETARIO. Josep Miranda

KASISTO. Joan Font

Pagojn sendu al
Caja de Pensiones para la Vejez y de Ahorros. Libreta núm. 2.303-26
Agencia Riera Blanca, 436
08028 BARCELONA

JUNULARA SEKCIO (H.E.J.S.)
Jordi Ferré
Apartado 23484
E-08028 – BARCELONO

FERVOJISTA SEKCIO (H.E.F.A.)
Ronda S. Antonio 46-50, 2º 4º
08001 BARCELONA

TURISMA SEKCIO KAJ ELDONA FAKO kaj "FUNDACION ESPERANTO"
Inés Gastón
Pº de la Constitución 35, 4º
5001 ZARAGOZA

LIBRO—SERVO
Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID
Pagojn por LIBRO—SERVO
Cuenta Postal 3.118.078 VALLADOLID

ĈEFDELEGITO DE U.E.A. EN HISPANUJO
Juan Azcuenaga Vierna
Gral. Dávila 127, portal 7, 2º izda.
Tel. (942) 33 94 87
Cuenta Postal 03548531
39007 SANTANDER

OFICEJO
Rodríguez San Pedro, 13, 3º P-7
28015 MADRID

INFORMA OFICEJO
Vakas

## 49a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
**Bilbao 17a ĝis la 22a de Julio 1989**

### K O N G R E S E J O

FACULTAD DE CIENCIAS ECONOMICAS Y EMPRESARIALES
Avda. del Ejército 83. 48014 BILBAO

Ĝi estas loko tre konata en Bilbao kaj facile atingebla, ĉu aŭtomovile, ĉu trajne, ĉu buse. Poste ni sendos mapon al ĉiu kongresano.

### R E S T A D E J O

COLEGIO MAYOR DEUSTO = Barrio Ugasto s/n 48014 Bilbao
Telefono. (94) 435 92 00

Tiel, kiel ni jam havis okazon paroli al la kongresanoj en Valencio, ĉi tiu afero estas kaj estos grava problemo en Bilbao. Ĝis nun ni sukcesis atingi la menciitan Restadejon de la privata Universitato de Deusto. Ĝi estas tre bona restadejo (ni dirus luksan) sed NUR HAVAS INDIVIDUAJN ĈAMBROJN. Krome ĝiaj prezoj, **po persone**, estas, ĉi-jare, kun tri manĝoj 2.700 pesetoj. Ĝi troviĝas 10 minutojn piede de la KONGRESEJO. Ni klopodos, ke oni donu al ni alian prezon por nur ĉambro kaj matenmanĝo.

Pri pliaj eblecoj gastiĝi en hoteloj, pensionoj, k.t.p. ni informos poste. Tamen, ĉiuj adresoj troviĝas en la libro eldonita de la Ministerio pri Kulturo kaj Turismo.

**Jesús Miguel García**
**Prezidanto de la L.K.K.**



# LA MAGISTRATO DE LA LAGUNA KAJ ESPERANTO

La administrantaro de la urbo La Laguna (Tenerifo, Kanarioj), kaj la urbo mem, estas forte ligitaj al la historio de Esperanto. Unue tie J. Régulo fondis, en 1952, esperantistan eldonejon, kiu famiĝis en la Movado per la libroj markitaj je la nomo STAFETO; ĝi funkciis dum preskaŭ tridek jaroj kaj eldonis ĉ. cent volumojn, neniun kun malpli ol cent paĝoj, entute ĉ. dek naŭ mil presitaj paĝoj. En 1957 estis fondita en la sama urbo Esperantista Societo de Tenerifo, kiu aktivas ĝis nun. Aŭtune 1965 tiu Societo organizis, omaĝe al José de Anchieta, beatulo naskiĝinta en La Laguna, sukcesan Filatelan Ekspozicion, kun la kunlaboro de la filatelistoj de Tenerifo sub la patronado de la magistrato de La Laguna. En 1969 okazis la 29a Hispana Kongreso de Esperanto en tiu urbo. Lige kun la 29a Kongreso la magistratoj de La Laguna kaj de Santa Cruz de Tenerife donis la nomon **D-ro Zamenhof** al strato de La Laguna kaj la nomon **Esperanto** al strato de Santa Cruz. Okaze de la emeritiĝo de Prof. J. Régulo, placo de La Laguna ricevis lian nomon, interalie pro lia granda kontribuo al la tutmonda diskonigo de la urbo. Same en 1984 strato de La Laguna ricevis la nomon **Esperanto.** En 1987 la universitato de La Laguna eldonis 790-paĝan inkvartan volumon, dediĉitan ekskluzive al esperantismo, duan el la kvar, kiuj konsistigas la libron **Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo**. En 1988 Esperantista Societo de Tenerifo, en kunlaboro kun la Oficiala Lernejo pri Lingvoj de Santa Cruz de Tenerife, organizis je kosto de la Oficiala Lernejo kaj en ĉi-ties ejo, kurson de Esperanto. Jam de multaj jaroj la Societo kontribuas surstratan flortapiŝon al **Corpus Christi**, oficiala festo havanta longan tradicion en La Laguna kaj je kies flortapiŝada partopreno invitas la magistrato.

Lastatempe la magistrato de La Laguna donis plian ateston de sia respekto kaj konsidero al la loka Esperanto-Movado. Ĝi nome subvenciis per ducent mil pesetoj la Societon, por ke ĉi tiu riparu la du ĉambrojn, kiujn ĝi uzas kiel sidejon, senpage ceditajn en ŝtata domo por laboro de la societanoj. Plie la magistrato metis la Societon inter la kulturaj organizaĵoj, kiujn ĝi subvencias per cent mil pesetoj ĉiujare, en 1986, el pasinta administrojaro.

Kiel oni povas konstati, la urbo La Laguna estas firme ligita al la historio de Esperanto en Kanarioj, en la kontinenta Hispanujo kaj en la tutmonda Movado. Tio povis okazi dank' al pacienca, firma laborado por la afero, laŭ serioza kaj celkonscia strebado.

**J. Régulo**

# PILOLOJ (2)

La Registaroj de la Aŭtonomaj Komunumoj okazigas imponan rolon administrante la publikajn aferojn en ĉiuj partoj de la hispana geografio. Tio tute evidentas kaj neniu riskas opinii kontraŭe. Ĝuste pro tio la hispana esperantistaro devas konscii tian realecon kaj agadi konsekvence. Kiel kutime, ĉi-foje ankaŭ ne validas scii, nepras kompromisi kaj respondeci.

Jen kelkaj cerbumindaĵoj.

x.—De tempo al tempo, iuj Registaroj de Aŭtonomaj Komunumoj helpas la Movadon. La ceteraj, la plejmulto bedaŭrinde, tute malŝatas ĝin.

— Pri Deputitaroj kaj Urbestroj oni povas jesi la samon. Esperanto ne utilas al ili kaj konsekvence ili ne atentas ĝin.

— Mankas politikistoj, scienculoj kaj, ĝenerale, kleruloj favoraj al Esperanto publike kaj daŭre.

— Mankas en niaj Aŭtonomaj Komunumoj gravaj organizoj adoptantaj Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj.

— Escepte de tre malmultaj kazoj, la Internacia Lingvo ne troviĝas en la oficialaj lernejoj.

— Hodiaŭ preskaŭ neniu komerca aŭ industria entrepreno uzas Esperanton en Hispanio.

— En iuj Komunumoj Esperanto estus la 4ª lingvo lernenda oficiale.

— Unuagradaj instruistoj esperantistaj malabundas.

— Esperanto-aktivuloj malabundas.

— Tre ofte esperantistoj rezignas lukti favore al Esperanto.

— Mankas kuraĝo.

— La kapableco de preskaŭ ĉiuj hispanaj esperantistoj estas elementa.

— Ne estas vera enradikiĝo de E-o en la regionaj kulturo kaj vivo.

— Mankas Grupoj de Esperanto en sennombraj urboj kaj vilaĝoj.

xx.—Spite al manko de la koncernaj statistikoj, oni rajtas jesi ke E-o ne funkcias en niaj Aŭtonomaj Komunumoj ĉar:

— Mankas mona stimulo.

— Foje abundas entuziasmo. Tamen malabundas konstanteco, planado kaj esplorado de la socia medio.

— Erare oni ŝatas iun nacian lingvon kvazaŭ universalan.

— Mankas politika deziro renversi la nunan lingvan situacion.

— Kvankam teorie oni ŝatas E-on kiel taŭgan rimedon por la internacia komunikado, praktike oni preferas la anglan.

xxx.— Plurlingveco helpas aŭ malhelpas. Sed tio dependas de la klereco de la persono.

— La disigo inter la esperantistaj kleruloj kaj la esperantista amaso malhelpas grave la antaŭeniron de la Movado.

— La integriĝo de la regiona/aŭtonoma kulturo fare de la Movado kaj, inverse, de Esperanto fare de la regiona/aŭtonoma kulturo konsistigas bazan kondiĉon en la disvastigo de la Internacia Lingvo.

— La plibonigo kaj la pliigo de la specifa Esperanto-kulturo estas nepra ilo por prestiĝigi la Movadon.

xxxx.— Necesas varbi politikistojn, scienculojn kaj, ĝenerale, klerulojn.

— La tradukado de gravaj regionaj verkoj pruvus al la aŭtoritatuloj la taŭgecon de E-o.

— Kvalitaj priregionaj originalaĵoj en E-o atentigas ĉiujn.

— Turismaj broŝuroj kaj informiloj en E-o tre utilas por normaligi ĝin.

— Antaŭ ol peti la oficialan enkondukon de E-o en la Lernejojn, starigu ni kapablajn grupojn da instruistoj.

— Niaj organizoj aranĝu ĉiuspecajn kunvenojn, seminariojn, prelegojn, ktp, kaj enkonduku en ili Esperanton kiel unu el la laborlingvoj.

— Multaj radiostacioj bezonas kunlaboron. Ni havigu al ili niajn perradiajn kursojn.

— Konvenas aperigi en la gazetaro la lecionojn samtempe elsenditajn per la radio.

**Andrés**

# PAĜOJ EL LA HISPANA BELETRO

## GARCILASO DE LA VEGA (Toledo 1501 – Nico 1536)

Elstara poeto, brila renoviganto de la kastililingva poezio, perfekta kortegano renesanca. Dum sia mallonga vivo, li kunigis la idealajn elementojn kiel homo de armiloj kaj de beletro, ĉar samlerte li uzis armilon kiel plumon, kaj tial lia vivo estis, konstanta batalo por amo, poezia kreado kaj heroaĵoj.

Ĉar ne fermita al ĉiuj spiritaj ideoj kaj novaĵoj de sia epoko, li kun Boscan, adaptis al la kastililingva liriko, la modernajn italajn versajn formojn, inter ili la dekunusilaban verson. Jen ekzemplo pri ĝi:

*Viaj ĉarmoj en mi skribitaj restas,*
*kaj, se verki pri vi dezir'min regas,*
*vi sola verkas, verkon mi nur legas,*
*ĉar eĉ en tio mi timema estas.*

*Mia vol' pri vi sin manifestas,*
*ĉar, kvankam mi ja vin ne plene vidas*
*pri viaj bonoj mi senvide fidas*
*kaj al mi veron nura ŝajn' atestas.*
*Mi admiras nur vin, nur vi min ravas;*
*mia malbon' nur vin ĉiam deziras;*
*en la animo ĉiam mi vin portas.*
*Mi ja ŝuldas al vi, kion vi havas;*
*pro vi naskiĝis mi, pro vi mi spiras*
*pro vi mi devas morti, kaj mi mortas...*

La liriko de Garcilaso, havis la brilan riĉan enhavon de la ĉarmaj temoj, la novajn konceptojn pri amo kun nuancoj de certa platona idealismo kaj ankaŭ, elirintan rekte el lia propra malfeliĉa koro, realan sincerecon por esprimi la doloran senton, kiu premis lian spiriton pro certa granda amo kiun li sentis, sen la koncerna reciproko de la amatino, ama sento kiun li tiel majstre sciis esprimi. Rimarkindas, lia inklino por naturo, kiun li en siaj poemoj ofte uzis, kvazaŭ alian protagoniston de la dramo kiun li poezie rakontas, kiel estas konstateble en tiu ĉi fragmento de la "Unua Eglogo":

*La suno etendas siajn radiojn*
*sur belaj montoj kaj valoj brulantaj,*
*vekante la homojn, bestojn kaj birdojn,*
*kiuj tra la aero iras flugante*
*super verdaj valoj aŭ altaj pintoj,*
*plezure ĝuante grandan trankvilon,*
*libere sub ora suno brilanta.*
*Dum ĝi tiun ekzercon faras*
*kiel simplan taskon ordinaran,*
*al kiu propra naturo ĝin inklinas;*
*ĉiam ĉi animo mizere nigra*
*ploras, kiam l' ombro la mondon kovras*
*aŭ la lumo alproksimiĝas;*
*elfluu haste, larmoj, kuru galope...*

Iam antaŭ Garcilaso, neniu poeto kantis en la kastilia lingvo, la malfeliĉojn de amo profunde sentata aŭ la mil diversajn sentojn de idealigita amo, kiel oni povas legi en sama citita eglogo:

*Cia milda karesema parolo,*
*en kiu fremda orelo belsonas?*
*Ĉiaj ĉarmaj klaraj okuloj belegaj*
*kiun rigarde ili adoras?*
*Por kiu senkompate cia koro*

*ŝanĝis nian amon, tre malrespekte?*
*Kies kolon ciaj brakoj katenas?*
*Eĉ ŝtona koro tute ne toleras*
*vidi mian hederon, senkolere,*
*ŝiritan de sur mi, sur alia mur' fiksitan,*
*mian laŭbon sur alia ulm' plektitan*
*sen despera plorado senkonsola*
*ĝis la viv' estu finita;*
*elfluu haste, larmoj, kuru galope.*

La versoj, estas dolora lamento despere sentata, plendo kiu apenaŭ trovas la solan konsolon de naturo, kiun la poeto amas, kaj tial komunikas al ĝi siajn suferojn kiam li daŭrigas:

*Eĉ la ŝtonojn kortuŝas mia ploro*
*kaj la propran malmolecon frakasas;*
*kliniĝas emocie arboj, plantoj*
*kaj la birdoj min aŭdante, lasas*
*per ŝanĝanta trilo kaj prema koro*
*diveni mian morton per la kanto.*
*Kuŝas post vigla ardo*
*la sovaĝaj bestoj lacaj,*
*kaj la dormon forlasas*
*por aŭdi mian amaran ploradon;*
*ci sola rifuzis ja mian amon*
*eĉ sen turni la rigardon bonvola*
*post cia kruda jaro;*
*elfluu haste, larmoj, kuru galope.*

Garcilaso de la Vega mortis kiam li apenaŭ estis 35-jara, ricevinte gravan vundon en batalo, ĝuste kiam oni atendis de li ankoraŭ pli gravajn beletrajn kreaĵojn, pli altajn lirikajn atingojn. La delikataj brilaj poemoj de Garcilaso, kun temoj bukolikaj, pri grekaj-latinaj dioj kaj amaj argumentoj, kunvivis kun la tradiciaj lirikaj popularaj kanzonoj kiuj plenigis tutan epokon.

**Antonio Marco Botella**

---

## DEZIRAS KORESPONDI

---

INTERNACIA KORESPONDA SERVO helpos al vi trovi korespondanton-inon amikon-inon aŭ partneron-inon. Por pluraj informoj sendu unu internacian respondkuponon al: Box 163 Stn. "A" DOWNSVIEW, Ont. M3M 3A3 Kanado.

# HEJS Poŝtkesto 23485 E-08080 – BARCELONA
# 44a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
# de Tutmonda Junulara Organizo (TEJO)
# 15a ĝis 22a de julio 1988 en Zagrebo JUGOSLAVIO

---

Pere de tiu ĉi raporto mi rakontos al vi la plej interesan kion oni traktis en la 44a komitat-kunsido de TEJO kaj kelkajn komentojn pri IJK.

700 gejunuloj, pli malpli, kuniĝis en Kroata ĉefurbo por amuziĝi, labori kaj... enamoriĝi dum tiu intensa kaj mirinda semajno. La Kongresa Temo estis ĉi kaze "Komunikado en la 21a jarcento" kaj verdire kongresanoj plene partoprenis diversajn programerojn; ĉu Tiujn de la Internacia Scienca Kolokvo, ĉu malsamajn laborgrupojn (kongresa televido, radio, bulteno...)

La kurso pri Yugoslava folkloro tute sukcesis kaj dancemaj gekongresanoj montris al ni dum internacia vespero kiel bone ili lernis kroatajn dancojn. Artaĵetoj, pupteatro kaj skeĉo-preparado estis aliaj laborgrupoj kie amaso da gejunuloj laboris, ĝuis kaj interkonatiĝis. Bedaŭrinde, laborgrupo pri interhomaj rilatoj ne sukcesis pro la neebleco partopreni kongreson de sia gvidanto.

Internacia orkestro mirinde muzikis por ĉiuj ĉeestantoj same kiel en Hanovra IS-o. Internacia Koruso ne tiel bone kantis, sed, kompreneble, tio tute ne gravas.

Aliflanke, vesperaj programoj estis bone akceptitaj de plej multo el kongresanoj malgraŭ ke, laŭ mi, la ĉefa salono (kun sidlokoj ktp.) ne estis trafa por muzikprogrameroj.

Ankaŭ ni ĝojis dank al vizito de muzikgrupoj "Quizas", "Sasa", "Amplifiki" kaj "Persone", ekskurso Trakoŝea-n interesaj prelegoj kaj multe pli da aferoj kiujn mi ne povas detali ĉi tie. Por bone danci ĉiu nokte en dancejo oni bezonis konvenajn manĝaĵojn por havi sufiĉajn fortojn, sed, domaĝe, tio ne eblis en kongresaj tagmanĝoj. Bonŝance, la jugoslavaj prezoj estis pli malaltaj ol en Hispanio kaj dank al tio ni povis aĉeti necesajn manĝaĵojn en la urbo.

Tamen, la plej bona estas ke vi mem partoprenos venontan jaron. Ne malŝparu tiun belegan eblecon fari novajn geamikojn kaj amuziĝi gaje kaj pace. Fine nur restas rimarkigi gravan partoprenon de katalunoj, aragonanoj kaj baskoj.

**Iñaki Gauna**
**Komitatano de TEJO en HEJ**

## 13a H.E.J.S. – TENDARO EN VITORIO

La Loka Kongresa Komitato de la H.E.J.S.–TENDARO en Vitorio, informis nin, ke la Tendaro okazos ekde Sankta Jaŭdo ĝis Paska Lundo (kvin tagojn).

La loĝejo estos en la junulara restadejo "Manuel Iradier", kie ni havos sportejon, kunsidejojn, manĝejon, kvarlitan ĉambrojn...

La oficiala programo ankoraŭ ne estas fermita kaj pro tio la organizantoj deziras, ke vi sendu sugestojn al ili por ke nia tendaro estu amuza kaj fruktodona.

Nome de la L.K.K., la JEJS-prezidanto, invitas al ĉiujn esperantistajn junulojn ĉeesti.

Por sugestoj kaj aliĝiloj skribu al:

David Fernández Nieto
Sekretario de la L.K.K. de la 13a HEJS–Tendaro.
Paraguay 34 3 A.
01012 Vitoria–Gasteiz.

Certe ni kunĝojos en Vitorio.

## GRAVA ALVOKO AL LA ESPERANTO–GRUPOJ KAJ INDIVIDUAJ MEMBROJ JUNULARAJ DE HEF

HEJS deziras rememori al ĉiuj Junularaj Grupoj, Sekcioj kaj membroj apartenantaj al HEF, ke en la HEJS–Tendaro en Vitorio okazos la Ĝenerala Kunveno, al kiu ĉiuj gejunuloj estas invititaj.

Oni ankaŭ informas al ĉiu Esperanto-Asocio, ke oni devas elekti delegiton al la HEJS–Tendaro por la bona interkunlaborado de ĉiuj.

**Jordi Ferré Martínez**
**HEJS–Prezidanto**

## DEZIRAS KORESPONDI

–S-ro Marian Kedzior, Pawtova 13/10, 53-604 WROCTAW, Pollando. Li estas ekonomisto kaj pentristo.– F-ino Varga Csilla. Lahti u. 34 III/11 PECS 7632 Hungario. 20-jara, desegnistino ĉe la Hungaraj Ŝtatfervojoj, sportistino, ŝatas la naturon, muzikon kaj ĉefe vojaĝi kaj ekkoni amikojn.– Olga Glendová. Nad Vodovodem 56/240, CS-10800 Praha 10 Ĉeĥoslovakio. Geografio, interŝanĝi bildkartojn.–

# PENSOJ DE ZAMENHOF

**El la Parolado pri Universala Esperanto-Asocio**
**ĉe la malferma kunveno de U.E.A. en Barcelona 1909**

(Originala Verkaro paĝ. 302)

Estimataj membroj de U.E.A.! — S-ro Mudie, via prezidanto, petis, ke mi diru ĉe via kunveno kelkajn votojn de laŭdo aŭ mallaŭdo pri la agado de via Asocio. Ĉu mi esprimos laŭdon aŭ mallaŭdon, la respondo ne povas esti duba: post la tiel bonaj kaj gravaj raportoj, kiuj estis legitaj, post la agado, kiu en la daŭro de la lasta jaro estis plenumita de U.E.A., ne povas resti eĉ la plej malgranda dubo pri tio, ke, lasante flanke la instituciojn oficialajn, U.E.A. fariĝis la plej grava institucio de nia movado kaj ĝi al nia afero alportos pli kaj pli da utileco.

Antaŭ kvin jaroj, ĉe la Bulonja Kongreso, estis prezentita projekto de ĝenerala organizaĵo por la tuta esperantistaro. La Kongreso tiam ne volis tiun projekton kaj per deklaro difinis, ke estas nomata esperantisto ĉiu persono, kiu scias kaj uzas Esperanton tute egale por kiaj celoj, kaj ke nia movado ne estas oficiale ligita kun ia speciala idealo, kvankam la plej multaj el la esperantistoj ja sentis tiun idealon kaj estis konstante gvidataj de ĝi. Sed kelkaj esperantistoj havis la bonan ideon fari per vojo privata tion, kion oficiale fari ni ne povis. Ili kunigis ne ĉiujn esperantistojn, sed nur tiujn personojn, kiuj, akceptinte la internan ideon de esperantismo, deziras esti unuigitaj en internacia organizaĵo, por reciproka sinservado kaj alproksimiĝado, ĉar ili pensas, ke ili tiamaniere pli kaj pli multigos inter si ligilojn de solidareco kaj sian celon atingos pli rapide, ol per izola agado.

U.E.A. unuigas do ne ĉiujn esperantistojn, sed ĉiujn esperantismanojn, t.e. ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon. Ke la pli granda parto de la esperantistaro konsentas kun tiu ĉi ideo pruvas la fakto, ke en malmulte da tempo via Asocio ricevis la plej favoran akcepton en nia movado. Oni ĉie komprenas, ke U.E.A. liveras taŭgan neŭtralan fundamenton por ĉiuj interhomaj rilatoj kaj servoj, kaj el tiu ĉi reciproka sinhelpado rezultos pli da amikeco kaj estimo inter la gentoj, kaj foriĝos la baroj, kiuj malhelpas ilian pacan interkomunikiĝon. En tiu ĉi principo kuŝas la ĉefa graveco de via Asocio.

## NEKROLOGO

Lia Moŝto Profesoro MIGUEL SANCHO IZQUIERDO (Migel, Sanĉo Iskierdo) 98-jara mortis en sia urbo Zaragoza la 2an de decembro de 1988.

Kun doloro ni sciigas la perdon de nia kara samideano ŝate nomata kaj konata kiel Don Migel en la rondo de Zaragozaj esperantistoj.

Li estis unu el la unuaj membroj de la societo "Frateco" fondita en 1908 en tiu urbo. En 1909 li veturis al Barcelona por la 5a Universala Kongreso kaj en 1911 li fariĝis sekretario de "Frateco".

Mi ekkonis lin en la jaro 1954 okaze de la 15a Hispana Kongreso de Esperanto kiam li kunprezidis kongresan kunsidon en la universitato de Zaragoza. En 1959 ni kunvojaĝis al la 44a Universala Kongreso de U.E.A. en Varsovio, kie li reprezentis la Hispanan Esperantan Federacion.

En la j. 1963 oni elektis lin Prezidanto de la Hispana Federacio, kiun li tre lerte gvidis dum sep jaroj meze de tre malfacilaj cirkonstancoj. Sen lia prestiĝo, nia Movado certe tiam estus puŝiĝinta kontraŭ pli nombraj baroj. En 1967 li ekestis membro de la Patrona Komitato de U.E.A. kaj en 1969, kiam li ĉesis esti prezidanto de la Hispana Federacio, li estis nomita ĝia Honora Prezidanto. En 1968 li kunaranĝis la FONDUSON ESPERANTO, kiun li helpis mone. Tiu Fonduso organizas ĉiujare literaturan konkurson por la vivigo de Esperanto. Li estis kun ni en la Universala Kongreso de U.E.A. en Madrid kaj ankaŭ en pluraj nialandaj kongresoj.

Mi ne volas vundi lian humilecon, sed pro lia forpaso Esperanro perdis renoman, prestiĝan kaj humanisman adepton, kiu dum okdek jaroj levis alten en nia lando la signifon kaj rolon de Esperanto.

Al liaj familianoj ni esprimas nian tutkoran kondolencon.

**Salvador Gumà**

## DEZIRAS KORESPONDI

Ankaŭ parolas la anglan.– Pepa Lateva Teneva, 14-jara lernantino. Str. Gr. Ignatiev bl. 68 vh. 15ap. 27, ur. Jambol, Bulgario. Muziko k literaturo.– Teodora Coneva Todorova, 13-jara lernantino, komencantino. str. Sabi Jholev 46a ap. 2, Jambol, 8600 Bulgario. Muziko, matematiko, planedoj, ĉevaloj; kolektas poŝmarkojn, kalendaretojn, paperajn buŝtukojn.– Lenka Navrklová, 16-jara studentino, Mysliborská 311. 58856 Telč IV, Ĉeĥoslovakio.– Lydia Benešová, studentino, Táborská 39/372, 29301 Mladá Boleslav, Ĉeĥoslovakio. Kolektas bildkartojn kun maro kaj palmoj kaj ĉokoladojn.– Vladimír Karbusický, 15-jara studento, komencanto. Tylova 144, Velim okr. Kolín, 28101, Ĉeĥoslovakio. Naturo, moderna muziko, ĝardeno.

# UNIVERSALA KONGRESO DE VALENCIA

Kiel ĉiu hispana esperantisto scias, oni intencas organizi Universalan Kongreson en Valencia, kiu okazus en 1992 aŭ 1993.

Por bone organizi ĝin oni bezonas la entuziasman apogon de la landa movado, sen kies helpo tiu kongreso ne povos okazi.

Pro tio, ni dissendas tiun ĉi enketilon, por scii pli malpli bone kiel la hispana movado pretas kunlabori. Bonvolu plenigi ĝin. Se la respondoj ne estas abundaj aŭ kontentigaj, oni pristudos la eblecon rezigni je tiu Universala Kongreso.

1.— Kiel vi povos helpi:
   A— Per mono
   B— Per laboro
2.— Se vi elektis A, elektu inter la jenaj eblecoj:
   A.— Per donaco de mono . . . . . . . . . . . . kiom da pesetoj . . . . . . . . .
   B.— Per pago de kotizo
      (1. 500 pesetoj monate ĝis la Kongreso
      (2. 1.000 " " " " "
      (3. pli ol 1.000 pesetoj monate . . . . . . .
   C.— Per donaco de varoj:
      1. Libroj
      2. Poŝtmarkoj
      3. Aliaj (indiku kiujn)
3.— Se vi elektis B en la unua demando, diru kiel vi povus helpi:
   A— Laborante senpage en la kongresurbo:
      1. Dum la kongreso.
      2. Ekde unu semajno antaŭ la kongreso, ĝis la kongresfino.
      3. Pli da tempo (indiku kiom da).
   B— Laborante senpage en via propa urbo:
      1. Dum la tuta kongresjaro.
      2. Dum la tuta kongresmonato.
      3. Pli da tempo (kiom da)
4.— Se vi deziras helpi la kongreson per laboro, indiku en kiu fako:
      1. Tajpado.
      2. Ĝeneralaj administraj taskoj
      3. Librotenado kaj kongresa kaso.

4. Financaj aferoj (atingi subvenciojn, kotizojn, organizi loterion, peti helpon de la entreprenoj, organizi disvendadon de diverdaj varoj k.t.p.
5. Turismaj aferoj (hoteloj, aŭtobusoj, restoracioj k.t.p.
6. Presado kaj/aŭ redaktado (libroj, kongreslibro, informilo, folioj, konvertoj, broŝuroj k.t.p.)
7. Desegnoj.
8. Gvidanto.
9. Infana Kongreso.
10. Junularaj aferoj.
11. Artaj aranĝoj.
12. Enlanda informado.
13. Eksterlanda informado.
14. Komputorado de la Kongreso.
15. Internacia Kongresa Universitato.
16. Ĝenerala helpo.

17. SE VI DEZIRAS FARI ALIAN PROPONON, SUGESTION AŬ OFERON, BONVOLU SKRIBI ĜIN ..................................
..................................................................
..................................................................
..................................................................
..................................................................

NOMO ..............................................................
PROFESIO ........................................................
AĜO ..................................................................
TUTA ADRESO ..................................................
..................................................................

SENDU KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ ĈI TIUN ENKETILON AL:

Augusto Casquero de la Cruz
Avda. Burjasot 29, Escalera A, puerta 31
46009 VALENCIA
Teléfono (96) 340 13 69

---

**DEZIRAS KORESPONDI**

Barnabas N. Magesse. Bunda Esperanto-Grupo. P.O. Kesto 1051. BUNDA – MARA. Tanzanio. –

# TRE GRAVA ENKETO

Dum nia venonta Kongreso en 1989 en Bilbao la nuna HEF-estraro venos al fino de sia labor-periodo, kaj nova estraro iĝos elektita.

Aliflanke, tra la tuta Hispanio svarmas projektoj kaj agadoj plej diversaj cele al la mita jaro 1992. Kaj, tre grave, multloke ekzistas ŝtataj, komunumaj, mecenataj k.s. financaj helpoj por tiaj agadoj.

Evidente, tiel la nuna kiel ĉefe la estonta HEF-estraroj klopodos sukcesi enmeti sian poresperantan agadon en la impetan fluon al 1992, ĝuste en la kadro de la multaj kaj plej diversaj kulturaj agadoj kaj ekzistantaj aŭ planataj tra la tutaj iberiaj kaj latinamerikaj landoj.

Komisiite de nia estraro, mi akceptis la taskon organizi enketon inter ĉiuj HEF-anoj kaj ĉiuj legantoj de "BOLETIN", por peti de ili iliajn opinion kaj sugestojn por kiel eble plej adekvata planado de la venonta kaj jam tuja HEF-agado.

Mi tial varme petas vin ĉiujn, nepre kaj bolvole skribi al mi pri tiu temo. Mi ne povas promesi respondon al ĉiu skribonto, sed mi ja promesas atentan tralegadon de ĉiu letero kaj sistemigo de la enhavo por prezento al nia prezidanto kaj estraro. Se vi ankoraŭ ne bone mastras Esperanton, ne hezitu skribi al mi en via nacia lingvo; kio gravas, ja estas via valora kunlaboro al nia komuna celo.

Tre eblas, ke ni iom poste dissendos enketilon por sistema trastudado de la afero. Sed eĉ por redakto de la enketilo la enhavo de viaj leteroj ja estos valora ero.

Por helpo al via cerbumado mi prezentas ĉi-sube plurajn el la aferoj pri kiuj ni deziras kaj bezonas vian opinion kaj sugestojn.

Kun sincera antaŭdanko, amike kaj samideane via,

Antonio Alonso Núñez

Adreso: ESPERANTO, Apartado 714 — 15780 Santiago de Compostela

Informo pri ŝtataj, komunumaj, provincaj, mecenataj k.s. financaj helpoj por kulturaj agadoj cele al 1992.— Instancoj aŭ privataj homoj kompetentaj pri konsilado pri atingo de tiaj financaj helpoj kaj subvencioj.— Kunordigado de la por-esperanta laboro je nivelo de la hispana ŝtato kaj aŭtonomaj komunumoj unuflanke, kaj inter la iberiaj kaj latinamerikaj landoj aliflanke.— Paŝoj farendaj por atingi oficialan agnoskon de la kapablo instrui Esperanton kiel ankaŭ de allaso de Esperanto inter la studeblajn fakojn.— Kunordigado de nia esperanta eldonado.— Enkonduko de E-kurso en radion kaj/aŭ televidon kaj ĵurnalon kaj, nelaste, ĉe eldonejoj de plej diversaj lingvo-kursoj.— Kunlaborado kun turismaj kaj kulturaj entreprenoj por reciproka profito kaj internacia vojaĝado.— Indiko pri tio, pri kio vi estas kompetenta (pedagogio, juro, teatro kaj aliaj artoj, k.s.) kaj ĉu vi pretas kunlabori kun la ĝenerala HEF-agado, kaj sub kiuj kondiĉoj vi pretas tion fari.— Ktp., ktp; multaj aferoj estas atendendaj en la kadro de la nuna impeta fluo al la mita 1992.

**Antonio Alonso Núñez**

# RECENZO

*LA FENOMENO ESPERANTO – William Auld. Eldonejo UEA. Paĝoj 120. Formato 21,5 x 15 cm. Prezo 18,00 gld.*

La Fenomeno Esperanto de William Auld aperas kiel nova Jubilea Eldonaĵo de UEA kaj kiel bazo por la informado pri Esperanto. La verko konsistas el Enkonduko de Humphrey Tonkin kaj la ĉapitroj: 1a, la problemo; 2a, la solvo: teorie; 3a, la solvo: praktike; 4a, la lingvo Esperanto; 5a, tre konciza historio de la Esperanto-Movado; 6a, "limigita kaj artefarita literaturo"; 7a, kiel utiligi ĝin? 8a, kultura demando; kaj inter la apendicoj, la parolado de Zamenhof ĉe la Unua Kongreso de Esperanto.

La verko estas pledo por Esperanto kun ekspliko de la lingva konstruo, konciza historio de la Esperanto-Movado, la okazaĵoj de Montivideo en 1954, en kiuj estis akceptita de UNESKO rezolucio favora al Esperanto, kaj la alia rezolucio de UNESKO en sia 23a sesio, la 8an novembro 1985, en Sofio en kiu ĝi gratulas la Esperanto-Movadon en okazo de ĝia datreveno.

William Auld prezentas la strukturon de Esperanto kiel simplan kaj plendas pro la komplikaĵoj, kiujn aldonas iuj gramatikistoj, kio faras, ke la "facila" lingvo subite ekaperas "tro malfacila". La verbo –William Auld diras– estas mirinda, simpla. Tute mankas la malsimplaĵoj de la verboj hindoeŭropaj. "Kaj tamen la verkistoj de lernolibro, konforme al la nacilingvaj kutimoj, insistis pri ia **verbeco** de la participoj kaj parolis pri "kunmetitaj verboformoj", dum evidente –kaj tion insistas Zamenhof– la participoj havas sencon "adjektivan aŭ adverban".

"Kunmetitaj verbformoj en Esperanto ne ekzistas. Kio ekzistas, tio estas la verbo **est**- kun adjektivo. Pri la fakto, ke de tempo al tempo tio plej oportune tradukiĝas en alian lingvon pere de komplikita verbo, ne kulpas Esperanto. Esperanto mem estas treege simpla".

La verko de William Auld estas grava informilo pri Esperanto kaj la Esperanto-Movado. La esperantistoj multe povas lerni el ĝi, tamen konvenus traduki ĝin en multajn lingvojn por povi klare kaj koncize pledi por Esperanto al la ĝenerala publiko, ofte misinformata.

Esperanto kaj la Esperanto-Movado devas esti diskonigataj al ĉiuj kaj ĉien, ĉar kontraŭe ni riskas esti fermitaj en ni mem. "La Fenomeno Esperanto" estas taŭga verko por la disvastigado de Esperanto.

**G.M.E.**

Al: Esperanto — Asocioj, aliĝintaj al HEF kaj individuaj membroj de HEF. Estimataj samideanoj:

Jam komenciĝis la elektoprocedo por nova Estraro kaj Redakcio: la deĵorperiodo de la nunaj finiĝos en la 49a Hispana Kongreso de Esperanto en Bilbao.

Baldaŭ venos al vi la tasko elekti delegiton por reprezenti vian Esperanto-Asocio, Loka Esperanto-Grupo kaj Esperanto-Sekcio por la Kunveno de la HEF-estraro kun Delegitoj de Grupoj, kiu okazos la mardon 18an de julio kaj por la Ĝenerala Kunveno okazonta la merkredon 19an de julio.

Ni skribas al vi por atentigi la gravecon de via elekto. Delegiteco de Esperanto-Grupo ne estas honora ofico: ĝi estas esenca ofico en la strukturo de H.E.F. Ĝi proponas la estraron; ĝi kunlaboras en la funkciigo de la Federacio kiel tuto.

Ĉio ĉi signifas, ke Delegito, kiu reprezentas Esperanto-Grupon devus esti:

1. Bone informita pri la landa agado.
2. Influhava en via Grupo.
3. Preta partopreni la laboron de HEF-estraro.
4. Preta kunlabori en unu aŭ kelkaj sekcioj kaj fakoj de HEF.
5. Preta esprimi sian opinion-do ne nur ĉeesti, sed efective kontribui konstrue al la debatoj.
6. Kapabla bone kunlabori kun aliaj personoj.

Ideale, Esperanto-Grupo elektu personon el inter viaj estraranoj, pri kies rolo kiel via reprezentanto ĝi fierus.

Ni atendas kvalitan kontribuon de via Delegito kaj ni atendas je via kunlaboro tiucele.

Bonvolu memori, ke se vi deziras pliajn informojn pri la nova labor-periodo, nova estraro kaj redakcio kontaktu s-ron Antonio Alonso Núñez. Adreso: ESPERANTO, Apartado 714 - 15780 Santiago de Compostela.

Nur restas deziri al vi sukceson en via agado. Sinceran dankon.

**HEF – estraro**
**Salvador Aragay**

## KOTIZOJ POR LA INDIVIDUAJ MEMBROJ EN LA JARO 1989

| | | |
|---|---|---|
| Emerito, junulo kaj senlaborulo | 1.200 | pesetoj |
| Membro abonanto | 1.700 | " |
| Membro protektanto | 3.400 | " |
| Dunviva membro | 34.000 | " |

Estas evidente, ke en nia moderna vivo multaj etikaj valoroj ŝanĝiĝis. La nova koncepto pri la vivo kaj eĉ pri la morto, la konstanta martelado de la informaj komunikiloj por ĝuado de la nomata progreso, kiun alportis al ni la scienco kaj la tekniko, ŝanĝigas la pensomanieron de multaj homoj. Oni enkapigas ĉiutage la grandajn avantaĝojn de nia evoluo. Aŭtomobilo, vojaĝoj, televido, hejmaj maŝinoj kaj multaj aliaj produktoj okupas konstante la menson de ĉiu homo. Nia konsuma vivmaniero, tre ofte, malpliigas la rilatojn familiajn. Kaj en tiuj rilatoj, la veraj suferantoj estas la maljunuloj.

Antaŭe la filoj estis garantio de trankvila maljuneco. En la malriĉaj familioj oni rigardis la filojn, kiel hodiaŭ oni rigardas la bankokonton. Ekzistis inter gepatroj kaj gefiloj plena fido je reciprokra helpo. Ĉiam ekzistis esceptoj, sed la gepatroj ĉiam sciis, ke en la hejmo de siaj filoj troviĝos loko por ili, kiam la fortoj ne plu akompanos ilin. La vivkondiĉoj ĉiam dependis de la ekonomia situacio, sed la amo inter gepatroj-gefiloj brilis en sia tuta apogeo, eĉ se la ekonomiaj rimedoj estis nesufiĉaj. En kelkaj aspektoj sociaj tiu dependeco estis pro manko de socia helpo, sed ĝuste, tiuj ekonomiaj mankoj plifortigis la sentojn familiajn. En la riĉaj familioj ne ekzistis tiuj problemoj, sed okazis, ke la prizorgado de la maljunaj gepatroj signifis ankaŭ pliajn rajtojn, kiam venis la hereda momento. Evidente, ke en la riĉaj familioj estis reciprokra familia amo, sed meze, tre ofte, troviĝis gravaj ekonomiaj kvereloj familiaj.

Hodiaŭ en tia aspekto, tiuj familiaj rilatoj multe ŝanĝiĝis. La maljunuloj ne plu estas ŝarĝo por la gefiloj. Mi devas diri, ke estas esceptoj, komprenebla. La gepatroj ne plu rigardas siajn filojn, kiel propran trankvilecon por la estonteco. Eble ne sufiĉe, sed la socio nuntempre okupiĝas pri la maljunuloj, tamen kaj samtempe ankaŭ perdiĝis granda parto de tiuj familiaj rilaroj inter patroj kaj filoj. Ni ne sciis adaptiĝi, ni se sciis kunligi la nunajn plej favorajn ekonomiajn kondiĉojn kaj tiujn familiajn.

Nun estas multaj filoj, kiuj elhejmigas siajn gepatrojn. Estas multaj filoj, kiuj devigas siajn gepatrojn iri al gastejoj por maljunuloj. Estas multaj junaj homoj, kiuj havas liberan tempon por purigi la aŭtomobilon, aŭ stulte rigardadi la televidon; estas aliaj, kiuj avare observadas, ĉu ilia bankokonto pli valoriĝas, sed ili ne dubas eĉ momenton sendi siajn gepatrojn for de la hejmo. Pretekste, ke tie, en tiuj gastejoj, ili estos plej bone zorgataj, kio ja estas hipokrita mensogo; se la filoj pravas tiurilate, tiam la afero ankoraŭ estas multe pli dolora. Bedaŭrinde en multaj okazoj oni traktas la maljunulojn, kiel objekton ne plu uzeblan. Tre ofte eĉ la gepatroj pagas sian propran senhejmiĝon. Persone mi konas personojn, kiuj sendis sian patron aŭ patrinon al tiuj aziloj por maljunuloj. Ili estas personoj riĉaj, homoj kredantaj, homoj

kiuj sin nomas kristanoj. Ofte filinoj aŭ bofilinoj ne havas tempon por prizorgi la gepatrojn aŭ bogepatrojn, sed ili havas sufiĉan liberan tempon por iri al frizistino dum longaj horoj. La filoj aŭ bofiloj ne havas liberan tempon por siaj maljunal parencoj, sed tempon ne mankas al ili por iri al la futbalo, trinkejo aŭ absurde vojaĝi aŭtomobile, aŭ gape rigardi la televidon.

Sendube la kaŭzoj estas multaj, sed fakte la realo montras al ni, ke multaj maljunuloj estas devigataj forlasi sian hejmon por iri al azilo aŭ maljunula gastejo, kie ne ĉiam la zorgoj ricevataj estas taŭgaj nek adekvataj.

Mi ne scias, ĉu oni povas vivi, kun la konscienco trankvila, kiam oni kondutas tiamaniere kun tiuj personoj, kiuj laŭdire estas la plej amataj, la gepatroj.

Estas nediskuteble, ke la rilatoj inter la familianoj degeneras. Do, ni ne plu rajtas paroli pri homa amo, kiam la rilatoj inter la familianoj, iom post iom malaperas. Se tio estas sekvo de la progreso, se tiu estas la vojo de la nuna koncepto pri la vivo, mi povas antaŭdiri: ke ni iros al neniu paradizo.

**Luis Serrano Pérez**

## ESPERANTO ANTAŬ UNUIĜINTAJ NACIOJ: INTERVENOJ DE UNIVERSALA ESPERANTO–ASOCIO

Dum la deĵorjaro 1987-88, UEA sukcesis interveni en formalaj debatoj. Dum la Internacia Konferenco pri la Rilato inter Malarmado kaj Evoluigo (24 aŭgusto — 11 septembro 1987 —), UEA prezentis buŝe kaj skribe referaĵon "Aspektoj de komunikado en la ligo malarmado-evoluigo."

Dum kunsidoj de la Prepara Komitato por la Tria Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo pri Malarmado (25 januaro — 5 februaro 1988), UEA denove intervenis skribe kaj buŝe per referaĵo "La mankanta ligo en realigo de malarmado kaj evoluigo."

Dum la Tria Speciala Sesio mem (31 majo — 25 junio 1988), UEA ne ricevis permeson buŝe interveni, sed ĝi ja sukcesis emprotokoligi skriban intervenon, kiu enhavis interalie la rezolucion pri Esperanto de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1985.

## "VITORIA KAJ GROTIUS, ĈU DU PATROJ POR LA INTERNACIA JURO?"

La 21paĝa fotokopiita teksto de la prelego de D-rino M. Rafaela Urueña, en la 73-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Roterdamo, estas mendebla ĉe: Libroservo de H.E.F.; apartado 119; 47080 VALLADOLID. Prezo 150 p-toj.

# TURISMA ESPERANTO–KONGRESO

En la estonto, kiam mi pensos pri bonegaj interhomaj rilatoj ene de esperantista etoso, certe mi devos rememori la tagojn pasigitajn en la Turisma Esperanto-Kongreso okazinta en Alkmaar, post la U.K. en Roterdamo.

Ni loĝis en la Motelo, ekster la urbo, en vere alloga ĉirkaŭaĵo, kie flirtis dum la postkongresa semajno la esperantista flago. La fakto vivi tie, ne malhelpis bone koni la urbon mem ĉar jam estis programita promeno tra la bela malnova urbo, kaj boatveturo tra la Alkmaaraj kanaloj, vojaĝo kiu ĝojigis nin ĉiujn. Sed eble la kaŭzo, kial ĉi tiu urbo estas mondfama, estas la fabrikado kaj produktado de bona fromaĝo, kaj tion ankaŭ ni havis okazon konstati, vizitante la tre modernan fromaĝuzinon "De Prinses", kie oni klarigis al ni la fromaĝfabrikadon kaj invitis nin gustumi fromaĝpeceton kun kafo, laŭ la nederlanda kutimo. Krom tio, ni ankaŭ vidis la interesan spektaklon kiu ĉiuvendrede okazas en la Placo de Alkmaar: La fromaĝfoiron. Bunta spektaklo en placo plenplenega de turistoj.

Sed la programo estis bona aranĝita por ke ni konu aliajn vidindajn lokojn. Tiel, multaj ekskursoj estis antaŭviditaj, kaj ni ĝuis la fiŝkaptistan etoson en Volendam kaj Marken, vidante personojn kiuj ankoraŭ portas la tipajn vestaĵojn dę la loko, tipan malnovan domon interne, kaj la belajn malnovajn konstruaĵojn de la regiono. Ni vere ĝuis belan tagon, kiu ripetiĝis en la vizito al Enkhuizen, muzea urbo, apud la Suda Maro.

Ankaŭ tre interesa estis la vizito al Zaanse Schans, kie ni iris per ŝipo, kaj kie trankvile, ni povis vidi la diversajn muelilojn, bienojn, ŝuofaradon, kaj aliajn manfaraĵojn kiuj konserviĝas en ĉi tiu funkcianta muzeo plenaera.

Kompreneble ne povis manki tuttaga vizito al Amsterdam. En ĉi tiu interesa urbo ni vizitis la Historian Muzeon, situantan apud la beginejo, kaj per diversaj piedirataj stratoj ni promenis post boatveturo kun klarigado en esperanto.

Ni ĉiuj scias pri la historio de Nederlando kaj la sukcesoj kapti teron al la maro, kaj konstrui digojn. La plej grava estas la 30 kilometra digo inter Nordholando kaj Frislando, kiun ni vizitis, okulfrapate de la impona inĝenieraĵo, kiu sanĝis la tiaman Sudan Maron en dolĉakvan Ejsel-lagon.

Fine, mi deziras elstarigi ne nur la bonan aranĝadon de la Postkongreso, sed la sindonemon de ĉiu membro de la O.K.: s-roj Hoekstra (patro kaj filo), s-ro ten Hagen, kaj la S-inoj Massar kaj de Geus, kune kun aliaj geesperantistoj de Alkmaar, kiuj gvidis nin dum la ekskursoj, invitis nin al siaj hejmoj, kaj helpis nin ĝis la lastaj momentoj.

Ĉio kun la celo ke ni povu reveni hejmen feliĉaj kaj ke en la Postkongreso regu bonega etoso. Ambaŭ celoj estis atingitaj.

**M.R.URUEÑA**

## INTERNACIE

La Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR invitas partopreni en nova internacia esperantista aranĝo, kiu nomiĝas "JARMEZA ESPERANTISTA SEMAJNFINO" (mallonge: JES). Ĝi okazos de la 23a ĝis 25a de junio 1989 en la urbeto Markkleeberg, kiu estas kvazaŭ urboparto de Leipzig.

Petu pliajn informojn al: KULTURBUND DER DDR, Esperanto-Asocio, Käthe-Kollwitz-Strabe 115, LEIPZIG, DDR-7010.

## TOMBOŜTONO POR IVO LAPENNA

Geamikoj de Ivo Lapenna preparas tomboŝtonon kun masko el bronzo kaj la sekvanta teksto: "La konstruanto de la moderna Esperanto Movado. Plenuminte siajn taskojn en la vivo Ivo Lapenna trankvile forpasis. Dankon al la plej elstara esperantisto kaj humanisto.

Geamikoj."

Pluraj esperantistoj sugestis, ke ni lanĉu mondskalan kolektadon cele doni al "La Heroo de Montevideo" indan rememoron.

Amikoj de Ivo Lapenna, kolektiĝu por ke ni povu doni al li tomboŝtonon indan al lia rememoro. Sendu vian kontribuon al la suba adreso. Se ni ricevos ĝin antaŭ la 15a de septembro 1988, kiel kvitanco via nomo aperos en nia libreto pri Ivo Lapenna eldonota en oktobro.

Nia libreto verkita de multnombraj simpatiantoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna estas mendebla ĉe la suba adreo. Prezo: 50 d.kr. + sendokostoj.

Poŝtĉekkonto: Kopenhago 1 19 06 01, Peter Zacho Norregårdsvej 91, DK 2610 Rodovre, Danio.

---

**Asocio freŝe naskiĝis:** PERIL-Eŭropo.

(Asocio Por la Ekspansio de la Rolo Internacia de la Lingvoj de Kontinenta Eŭropo)

Ĝi ĉefe estas eŭropa asocio naskita en Francio celanta kunigi personojn malsamlingvajn, sed ankaŭ malsamkredajn politike, filozofie, religie, ktp., unuiĝintajn pro komuna malkvieteco lingva = **la hegemonio de la angla minacas ĉiujn naciajn kulturojn per baldaŭa neniiĝo.**

Ke nia asocio nomiĝas PERIL-Eŭropo kaj ne PERIL-Mondo estas precipe pro volo por efikeco: por ke la kontaktoj inter anoj estu laŭeble plej facilaj, ni limigis nian mapan areon al Eŭropo (ĉefe la Eŭropa Komunaĵo Ekonomia), la kontinento fakte plej kapabla prezenti reziston kontraŭ la anglalingva hegemonio, pro la riĉeco de siaj kulturoj kaj la etendeco ankoraŭ vasta de kelkaj lingvoj siaj. Ilia unuiĝo ebligos veran sinergion ĝisnune nelaŭtigitan. PERIL-Eŭrope, 4, Rue Monnaie, F. 30400 VILLENUVE-LES-A. Francio.

NOVA REVUO: **Historiaj Studoj,** 24-paĝa revuo de Societo por Studo pri Historio de Esperanto (SSHE). Jarkotizo L5. – 8, Vardre View, Pentywyn Road. DEGANWY, GWYNEDD. LL31 9TE, Britio.

---

Ni ricevis por diskonigo: MONDA SOLIDARECO (esperanta lingva eldono). Trimonata informilo de la "monda fonduso de solidareco kontraŭ la malsato".
**"Monda Solidareco"**, "Les Nids" SAINT AUBIN DE LUIGNE, 49 190 ROCHEFORT SUR LOIRE (Francio).

---

**BUDAPEST.**– La Hungara Nacia Biblioteko ĝoje partoprenas en la festa ĝojo de la jubileanta esperantistaro. En la jubilea jaro 1987 en la tempo de la Budapeŝta Printempa Festivalo ili aranĝis Ekspozicion de Esperantaj Libroj titolitan "La Vojo de Esperanto-libro en Hungario". La ekspozicio konsistis en la libroj de Károly Fajszi, kies Esperantaj kolektoj havas preskaŭ 20.000 bibliografiajn unuojn, inter ili pli ol 7.000 librojn kaj 3.000 binditajn jarkolektojn.

**BRITUJO.**– Honore al la Centjariĝo de Esperanto la Landa Asocio, Esperanto-Asocio de Britujo organizis Esperantan Jubilean Feston. Ĝi okazis la trian, kvaran kaj kvinan de julio kaj konsistis el solena malfermo kun paroloj de bonkonataj esperantistoj, kantado de la Lodona Esperanto-ĥoro; ludado de la teatraĵo "La Graveco de la Fideliĝo" de Oscar Wilde tradukita de William Auld speciale por la Festo, kaj Koncerto de la Londona Kimra Virvoĉa Ĥoro.

---

**FOKUSO**

**Scienca revuo mult-faceta**

Tiu-ĉi nova multatema kajero prezentas serion de mallongaj artikolok kaj eseoj dividitaj en kvin fakojn: robotiko, informatiko (mikrokomputiloj), kancer-esploron, ekonomiko kaj ortinologio.

La verko estas tre atentinda pro siaj pluraj specifaj karakterizoj: la aktualeco de ĉiuj elektitaj temoj, la scienca valoro de ilia pritrakto, la fakto ke preskaŭ ĉiuj kontribuaĵoj estas originale verkitaj en Esperanto, fare de specialistoj, grandparte hungaraj.

Plie. La 100-paĝa kajero kontribuas al la pliriĉigo de la lingvo per kelkaj novaj sciencaj terminoj netroveblaj en PIV.

**Gian Carlo Fighiera**

# RECENZO

## "Til' Strigospegul' "
## ELSTARA TRADUKO DE MEZEPOKA VERKO

En la gilda mondo de la germana malfrua Mezepoko naskiĝis la pikareskaj rakontoj pri la faroj de Til' Strigospegul', pseŭdo-historia vagabondo, mokulo kaj fripono, kiun la ikonografia tradicio prezentas kun strigo (simbolo de saĝeco) en unu mano kaj spegulo (la viv-komedio) en la alia.

La 96 tre mallongaj historietoj, parte originalaj parte apokrifaj, nun aperintaj en Esperanto dank' al la pietato de Richard Schulz, estis kunmetitaj de anonimulo en la 16a jarcento kaj de triam fariĝis specimeno de popola literaturo.

Verdire, la verko estas interesa por modernulo pli kiel fonto de sociologiaj informoj pri pasinta epoko ol kiel liveranto de literaturaj valoroj. La originala lingvaĵo —kiun la tradukinto perfekte imitas— estas kruda, malriĉa kaj primitiva. La aventuroj en la plej diversaj urboj de Centr-Europo (Germanio, Pollando, Danlando, Flandrio kaj Italio) de Strigospegul' —jen barbo-skrapulo, jen falsa kuracisto aŭ falsa pastro, jen ŝuist-lernanto, ktp.— estas en si mem ofte trivialaj, malofte spritaj. Strigospegul' ne posedas la ĉarmon de socia ribelulo, kiu utiligas la mokon kiel armilon kontraŭ subpremantoj. Li detruas ĉion ĉirkaŭ si, eĉ se per tio li malutilas al malriĉuloj aŭ al bonfarantoj. Sen paroli pri la skatola (en la kemia senco) aspekto de la malheroo.

Ne, Strigospegul' ne havas la rafinitecon de liaj mezepokaj antaŭloj priskribitaj de Boccaccio, nek de liaj renesancaj Rabelais-aj posteuloj, nek de Lazarillo de Tormes.


Feliĉe, la traduko posedas grandegajn kvalitojn kaj tial jam fariĝis modelo de sia genro. Ĝi kreas arkaikan Esperanton por redoni arkaikan originalon. La rimedoj tiucele utiligitaj estas morfologiaj, kiel la utiligo de la pronomo "ci", semantikaj, kiel la uzo de "paroli" en la senco de "diri" kaj sintaksaj, ekzemple la ĵonglado per vorto —kaj fraz— ordo.

**Gian Carlo Fighiera**

---

## DEZIRAS KORESPONDI

– S-ro Póth Gábor. H-1044 BUDAPEST. Printer J.U. —10/a Hungario. 27-jara, kemiisto, Interesiĝas pri hispana vivo kaj hispanaj homoj. – La membroj de Esperanto-Grupo "RAMON MOLERA PEDRALS", Calle 16 -1710 QUIVICAN, Habana, Cuba; Roberto Paez Campo, Ave 19 –2610; Henry Hidalgo Hdez. Calle 18 -2113; Idalberto Romero Bermúdez, Calle 16 -2325; Juan Córdova Colón, Calle 14 -1708; Egla (ino) Barrelo González, Ave 7 -607, San Felipe; Odalys Zamora Machado, Calle 18 -1709; Josyry González Bausi, Calle 22 -2310; María Magdalena Viera, Ave 15 -1215. Ĉiu el ili loĝanta en QUIVICAN. LA HABANA. Cuba.–













**Mendeblaj ĉe: Libroservo de HEF**
**Poŝtkesto 119, 47080 - Valladolid**